

## BRILA KOMETO

Populara  
Vortoj: Emanuele Rovere (Manŭel)

Brila kometo, en kristnaska ĉiel'.

Vi memorigas min pri mia infanaĝo,  
kiam ŝajnis altegaj la kristnaskaj arboj al mi,  
centoj revoj ekfloris en mia fantazi'.

Arĝenta stelo, de supre vi gvidas min  
al la naskiĝa loko de Kristo Jesuo.

Scenejo kortuŝa pri la plej grava event':  
ekis la historio de l'Nova Testment'.

Vin sekvante, mi trovas la vojon,  
kiu trafas la fonton de l'Amo,  
reakiras mi sentojn perditajn de Amo por la tuta homar'

Bela steleto, varmas jam mia kor'.

Vin rigardante sentas mi specialan ĝojon,  
kiu troviĝas nur en la Sankta Famili':  
venas el Betlehemo la vivekzemplo por ni.

Repaciĝas sub vi ĉiuj koroj,  
adorante la bebon Jesuo,  
dum la vicoj anĝelaj dissendas la gloran kanton en ĉiel'

Brila komento, elkore mi dankas vin.

Rekte vi gvidis la tri Magojn al celloko.  
Konduku nin same al la plej granda trezoro,  
apud Kristo Jesuo: Li estas nia savo.

Jen naskiĝis Jesuo,

SAVANTO DE LHOMARO!